La Esperanto-Gironde Informilo

NOVEMBRO 2022

N° 169

Novembra lilako

Stranga aŭtuno

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON
la 18an de SEPTEMBRO 2022
je la 10a45

Ĉeestas: Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Katya Gradzion, Lucienne Laroche, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez

Senkulpigitaj: Jean-Seb Brilleaud, Joël Lajus, Bernard Sarlandie kaj Rose Sarlandie

Elvezio salutas kaj dankas la ĉeestantojn.

1. Dato de la Ĝenerala Asembleo

La venonta Ĝenerala Asembleo okazos la **16an de oktobro** en Pessac, ĉe Jean-Seb. Grava afero estos la renovigo de la komitato, ĉar Martine deziras rezigni pri sia posteno de kasistino.

2. En la Universitato

La Esperanto-kursoj okazos ekde la venonta merkredo de la 17a30 ĝis la 19a.
Clément baldaŭ revenos al Bordozo, ĉar UEA ne plu ricevas monon de Eŭropa Unio, do TEJO ne plu povas dungi volontulojn. Estus bone, ke li renkontus Katya, kaj cetere partoprenu en la ĝenerala asembleo.

3. La Brasensa kanzonlibro

Pri la aŭtorrajtoj:
Yannick sukcesis kontakti la taŭgan personon ĉe Universal: estis petita la prezo de la libro sen impostoj. Yannick telefonis al MAIF, por scii, ĉu la asocio devas kalkuli kun impostoj.
Elvezio devis mem, kiel prezidanto, fari la demandon. Advokato respondis, ke se temas ne pri lukra kutima agado de la asocio, sed pri flanka agado, ĝi ne devas pagi la aldonvaloran imposton (AVI = TVA)
Kontoj:
Martine: Estis enkasigitaj per la labordokumento 3946 €, inkluzive de la donaco de Serge (1300 €).
Estis elspezitaj:
- Blaise: 1503,80 € (3,80 € = kosto de la ĝiro)
- presisto: 1084,13 €
- kovertoj: 21,89 € (restas 65 kovertoj)
- sendokostoj: 124,66 €

Sume: 2734,48 €

Klodin', Yannick, Katya

Marcelo: Tiu konto koncernas ja la labordokumenton. Se ni akiros la rajtojn en taŭga tempo, ni publikigos libron, kio estos flanka afero en nia agado. Sed ni ne faros grandan profiton, pro tio, ke ni devas vendi ilin kun 33%-a rabato al la revendistoj.
Yannick: Pere de Pierre Schuller, ni povos rekte vendi sufiĉe multajn.
Klodin': Oni devos revizii la sendokostojn.
Martine: Sendokostoj por unu libro en Francio: 7,50 €, kaj por Eŭropo (kondiĉe, ke temas pri libro en la franca): 2,86 €.
Oni ricevis averaĝe po 13,23 € por unu libro.
Yannick: Senpagaj ekzempleroj:
- leĝa depono: unu por BNF + unu por Biblioteko de Bordozo
- P. Schuller: unu
- Muzeo de Sète: unu

Marcelo: Entute estas 66 kanzonoj, el kiuj 64 ĉe Universal (41) kaj ĉe Warner (23). Pri *Jehan l'Advenu*, Jacques Yvart donacas siajn rajtojn al Esperanto-Gironde, kaj por *Heureux qui comme Ulysse*, la svisa firmao sekvos la internaciajn firmaojn.
Yannick: Ĝis nun oni ne firme scias, kiom kostos la aŭtorrajtoj. Estis unue dirite po 6 € (+ AVI = 6,60 €).
Martine: Sur la kuranta konto, estas 3482,98 €, kaj sur la ŝparkonto: 3055 €.
Estis en 2022 19 aliĝoj: 354 € kaj la kaso enspezis 63 € per vendo de malgranda materialo (libretoj, ktp). Sume: 417 €.
Marcelo: Faros prezenton de Brassens la 4an de decembro en Angers: la libroj estu presitaj antaŭ tiu dato.
Yannick: Ni devas antaŭe akiri la permeson de la firmaoj. Se ni presigas «librojn», ni devas aldoni leĝajn precizigojn sur specifaj lokoj de la libro: ISBN, kopirajtoj, dato de fino de presado, prezo en eŭroj, dato de la leĝa depono (konjektita), eventuale dato (monato kaj jaro) de represo.
Li dufoje telefonis al Warner, sen respondo. Universal laboras nun pri nia dosiero.

DECIDO:
Ni presigu 100 pliajn ekzemplerojn. La pdf devas esti sendita al la presisto antaŭ la fino de oktobro.
Je la ĝenerala asembleo (la 16an de oktobro) ni faros la decidon:
Se ni ricevis la taŭgajn respondojn kaj sekve havas ĉies permeson, ni presigos ĝin kiel libron (prezo: 18 €).
Se ni ne ricevis ĉiujn el ili, ni denove presigos ĝin kiel labor-dokumenton (same kiel ĝis nun).

4. Sidejo, arkivo

Ni devas havi novan sidejon. Ĉu ĉe la urbodomo de Cenon?

Marcelo kaj Klodin' demandos morgaŭ pri tio al Céline Dotigny.

La lundaj kursoj devis okazi en la Maison des associations, en la salono de la komputila fako, sed tio ne plu eblos post la 20a de septembro. Do la kursoj okazos en la mediateko, kiu estas lunde fermita. Devos esti solvita la problemo pri la ŝlosilo.

La ŝranko kun la lernmaterialo estos translokigita en la mediatekon. Restas tri ŝrankoj: kelkaj dokumentoj povus esti arkivigitaj en la departementa arkivejo. Bernard ne donis novaĵojn pri S-ino Vatican. Ĉio devos esti malaperinta antaŭ la jarfino.

La cetero, libroj kaj malnovaj revuoj, estos portitaj al Bouresse (pli malpli 300).

Yannick rilatos kun Philippe Cousson por programi viziton al Bouresse. Eble la tuton povos enteni la veturilo de Yannick, do ne necesus lupreni kamioneton.

Lucienne, Marcelo, Elvezio, Martine

Klodin': Ĉiuj libroj estis registritaj antaŭ la ferioj kaj kuŝas en skatoloj (pli malpli 20). Ĝis nun, neniu ŝranko estis translokigita el Palmer. Oni ne rajtas kunveni aŭ restadi, sed oni rajtas veni por preni materialon ĝis la jarfino.

La transporto de la libroj al Bouresse estos demando traktenda okaze de la ĝenerala asembleo, la 16an de oktobro.

Cetere oni devas demandi al Bernard, kio povos esti translokigita en la departementa arkivejo. Por la arkivejo, la asocio devas mem listigi la dokumentojn.

5. Aliaj aferoj

Marcelo intencas proponi prezenton pri Ukrainio por la Zamenhof tago.

Katya aktualigis sian prelegon por prezenti en Angers.

Marcelo preparis artikolon pri la kanto *Viburno ruĝa* kaj ĝin kompletigos per intervjuo de ukraina artistino (grafistino kaj poetino). Li korespondas kun ŝi. Ŝi estas junulino el Mariupolo kaj fuĝis al Lviv, kie ŝi tre aktivas. Ukraina poeto tradukos ŝiajn poemojn al Esperanto.

Martine: Sur nia bankokonto estas sumo por Ukrainio; eble ni povos ĝin pligrandigi okaze de la Zamenhof-tago; dato proponita: **la 11a de decembro**.

La kunveno finiĝas je la 12a30.

Janine

ESPERANTO-GIRONDE
ĜENERALA ASEMBLEO
en Salono SIMONE SIGNORET
CENON
la 16an de OKTOBRO 2022
je la 10a30

Ĉeestas: Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Katya Gradzion, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie

Senkulpigitaj: Jean-Seb Brilleaud, Gloria Gargallo

1. Agadraporto

De post la antaŭa Ĝenerala Asembleo (14an de novembro 2021):

• LEGI: aperis 3 numeroj 166, 167, 168

• Kunvenoj: okazis 5 kunvenoj:
- la 30an /01 en Palmer
- la 06an /03 en Palmer
- la 23an /04 en salono Simone Signoret (kun prelego de Valentyna kaj Katya)
- la 16an /05 en Palmer (ordigo de la ŝrankoj)
- la 18an /09 en salono Simone Signoret

• Okazaĵoj:
- Brasensa turneo de Marcelo kaj Kloldin' en Parizo kaj norda Francio de la 15a ĝis la 21a /10 2021.
- Anonco pri la forpelo el Palmer en junio 2022.
- Alveno de ukraina familio ĉe Marcelo kaj Klodin': Valentyna Gradzion, ŝia filino Katya, ŝia boflino Jana kun ties filino Anna. Ili restis dum pluraj monatoj, poste reiris en Ukrainion, kaj en septembro Katya revenis en Francion, kie ŝi intencas resti.
- Helpo al Vinilkosmo post inundo per du abonoj po 150 €.
- Partopreno de pluraj membroj en la kongreso de Trelisako, kie la kanzonlibro estis prezentita.
- La projekto pri oficialaj Esperanto -lingvokursoj en la universitato ne povis konkretiĝi por 2022-2023.

Ne plu restas kanzonlibroj (la plejmulto estis forvenditaj, kelkaj estis donacitaj, laŭ la projekto).

Funebrado:
- Thérèse Cayatte: 4an /11/2021
- Marian Nesse (Kajto): 8an /02/2022
- Claude Nourmont: 25an /02/2022
- René Guillaume: 9/08/2022

Elvezio informas, ke en Universitato estas ĉijare du lernantoj ne studentoj (Jean-François kaj Hervé, kiu jam staĝis en Grésillon). Clément ĉeestis la unuan kurson kun sia amikino Constance.
Marcelo: Estus interese enŝovi ilin en la asocion por plijunigi la asocion.

La agadraporto estas unuanime aprobita.

2. Financa raporto

- Aliĝkosto : ĝi restas la sama : **individuo = 20€ - paro = 27€**

Bankokonto: 3522,98 €
Ŝparkonto: 3055 €

Elspezoj:
asekuro: 109 €
retejo OVH 51,45 €
poŝtkostoj por LEGI: 37,66 €
poŝtkostoj (aliaj): 13,70 €
reĝkuko: 15,90 €

Esceptaj kostoj:
kartonskatoloj: 35,99 €
donacoj: 300 € (Vinilkosmo)
floroj por Germaine: 67,90 €
donaco al Espéranto-France (kalendaroj): 45 €
subteno vojaĝkostoj Ukraininoj: 79,96 €

Enspezoj:
aliĝoj: 353 € (19 aliĝintoj)
vendo bildstrioj: 64 €

Restas 183 € destinitaj al Croix Rouge Ukraine (kompletigotaj okaze de la Z-tago?)

Kanzonlibro:
Elspezoj: 2734,48 €
desegnisto: 1500
presado de 200 ekzempleroj: 1084 €
kovertoj (restas 65 el ili): 21,89 €
sendokostoj: 124,66 €

Estis subvencio per poŝtmarkoj: 324 € (restas cento da poŝtmarkoj 125 €)

Enspezoj: 3996 € (inkluzive de la subvencio de Serge: 1000 € por la presado)
ĉina filmo: 300 €
donacoj al la Kompanoj: 2696 €

Kosto de 1 Colissimo: 7,45 € por 500 g ĝis 750 g.

Martine, Joël, Katya

Bernardo: La problemo estas la malkresko de la nombro de aliĝantoj.

Klodin': KD de Brel estis donacita al tiuj, kiuj aĉetis la libron en Trélissac, fine de la prelego. Iu esperantistino de Périgueux transsendis leteron de belgino, kiu deziris mendi 3 librojn. Ŝi eksciis, ke la aĉetintoj en Trélissac ricevis KDojn de Brel, kaj deziras ricevi 3.
Ne plu estas Brel-KDoj en la ŝrankoj.

La financa raporto estas unuanime aprobita.

Martine informas, ke ŝi rezignos pri sia posteno de kasistino, kiam la afero pri la kanzonlibro estos finita. Poste, ŝi milde transdonos la taskon al la venonta.

3. Renovigo de la komitato

Kandidatoj al la komitato:
Elvezio Canonica
Janine Dumoulin
Martine Edelbloude
Katya Grazion
Monique Dussenty
Jean-Seb Brilleaud

Ĉiuj estas unuanime elektitaj

Estraro: Neniu ŝanĝo je ĉi-dato.

4. Atingoj kaj projektoj

(1) Translokigo de la libroj

Yannick povos iri al Bouresse la 30an de oktobro. Li prenos la librojn la 28an en Palmer.
Marcelo povos helpi: unu ŝranko kaj duono: malnovaj gazetoj kaj libroj.
Bernard: Neniu novaĵo el la departementa arkivejo. Li kontaktos S-inon Vatican.
Klodin': La ŝrankoj ne estas forportitaj. Ili estos detruitaj, se neniu transportos ilin. Unu entenas la kurso-materialon; ĝi ne estis translokigita.

Marcelo: La kursoj okazas en la urba biblioteko, sed la ŝrankoj ne konvenas en la meblaro de la biblioteko, do ni devos aĉeti unu.
Bernardo estas interesata pri unu ŝranko; li venos la 28an al Cenon por ĝin preni.
Marcelo: La dosieroj pri la historio de Espéranto-Gironde mem, fotoj de la kongresoj, numeroj de LEGI estas por la arkivejo.
Bernard havas hejme dokumentojn kaj panelojn de Leo.

(2) Onta sidejo de la asocio

Klodin': En Cenon estas multaj asocioj. La responsulino pri kulturo estas malsana, kaj neniu povis respondi, ĉu eblas decidi, ke la sidejo de Espéranto-Gironde estu ĉe la urbodomo. Plie, ŝi baldaŭ foriros, kaj oni ne scias, al kiu fari la demandon.
Marcelo proponas, ke, kiam li iros por viziti la estrinon de la biblioteko, li petos, ĉu Espéranto-Gironde povos havi la sidejon je la adreso de la biblioteko.

Lucienne, Marcelo, Klodin', Elvezio

(3) Kanzonlibro

Yannick: La afero kun Universal estas plimalpli solvita. La 25an de septembro, Martine subskribis la kontrakton je po 6 € (krom imposto) por 100 ekzempleroj, t.e. 246 € krom imposto, pagenda je ricevo de la fakturo. La fakturo estos sendita ĉirkaŭ la 20an de oktobro. Temas pri trijara permeso, implicite renovigebla, ekde la dato de la subskribo de la kontrakto. Ĉiu plia presado devos ricevi novan permeson.
La AldonValora Imposto (AVI= TVA) estas 10 % por la aŭtorrajtoj.
Tamen Warner parolis pri AVI je 5,5%.

Dominiko, Yannick

Ĉe Warner, la prezo ne estas por ĉiu titolo, sed ekzistas minimuma tarifo: 250 € krom imposto por 100 ekzempleroj aŭ pli. Yannick demandos, kiu estas la nombro maksimuma por 250 €. Warner ne sendis prezproponon.

Estas devigaj mencioj por meti je difinitaj lokoj; la PDF por la presisto devos est modifita.

Marcelo: La prezo de la presado certe plialt ĝos. La 4an de decembro, li prezentos en Angers la prelegon al kvardeko da homoj, do la presado devas esti mendita komence de novembro.

Yannick: La prezo estos 18 € (kiel notite en la kontrakto kun Universal). Oni ne povas presi antaŭ ol ricevi la kontrakton de Warner.
Marcelo: Ni povas mendi kvindekon da ekzempleroj de la «labordokumento» por Angers. Poste, ni vidos.

Estas decidite: Ni povas atendi ĝis la fino de oktobro por mendi la presadon de 50 ekzempleroj de labordokumento. Dume, Marcelo povos modifi la PDF-on por mendi la presadon de la libro, kiam ĉio estos solvita kun Warner.
Yannick: Oni povas esperi vendi librojn al la Brassens-ŝatantoj, atingeblaj per retejo, Facebook…
Bernardo intencas partopreni en la UK en Torino kaj povos porti kelkajn librojn.
Klodin': Oni atentu pri la kostoj kaj la devigoj, kiam oni proponas libron al librovendistoj: oni devas anstataŭigi la difektitajn librojn (pro suno aŭ foliumado) kaj mem porti librojn al la librovendejo.

Bernardo, Rose

Yannick: Oni povus organizi staĝon en Bouresse por kanti Brassens, sed kiu gvidus ĝin? Ĉu oni povus trovi muzikiston?
Marcelo: Se oni eldonos la libron, estos komplike ĝin vendi, gvidi staĝojn, organizi bild-prelegojn ktp.

La Ĝenerala asembleo finiĝas je la 13a30.

ꕥ

Ordinara kunveno post la tagmanĝo

La Z-tago okazos la **11an de decembro**: **kiu faros kion**?
La sekvonta kunveno okazos la **22an de januaro**.

Dum la posttagmezo, Marcelo eksperimentas ludon pri Brassens por Angers: li disdonas paperetojn po unu, sur kiuj estas skribitaj rimoj, kiuj mankas en la projekciita teksto de kanzono. En tiu okazo, ni devas retrovi la rimojn *de La Kaptado de papili'*, traduko de Roger Bernard por La Verda Kato, kiu fermiĝis en 1955. Temas verŝajne pri la unua traduko de teksto de Brassens.
Kiam ĉiuj rimoj estas retrovitaj, ĉiuj kune kantas la kanzonon.

Janine

NI FUNEBRAS

La 9an de aŭgusto forpasis René Guillaume, iama prezidanto de Espéranto-Gironde.

Omaĝe al René GUILLAUME

Mi tre malofte aĉetas la ĵurnalon sabate, escepte kiam mi ferias sen la reto. Do, sabaton la 13an de aŭgusto, mi aĉetis Sud Ouest, kaj ege malĝojan novaĵon mi legis: la forpaso de nia iama Prezidanto René GUILLAUME.
René estris bazlernejon kaj, kiam li emeritiĝis, li forlasis sian regionon en la orienta parto de Francio, kaj transloĝiĝis kun sia edzino Danièle en la sudon de departemento Gironde.

Tuj ili ambaŭ aliĝis al nia asocio kaj René iĝis prezidanto post Mikaelo LAVERGNE, mi pensas. Li multe laboris per kaj por Esperanto. La paro partoprenis en la Finnlanda UK en Tampere. Kiam li fariĝis urbestro de sia vilaĝo Hure, li invitis junajn esperantistojn el diversaj landoj por komunuma somera laboro. Mi ankaŭ memoras kiam ili akceptis nin en sia domo por nia ĝenerala asembleo.

Ili estis kantistoj kaj René agis kiel ĥorgvidanto. Mi memoras kiam ni inaŭguris «Allée de l'espéranto» en St André de Cubzac, li gvidis nin por kanti la eŭropan himnon, en Esperanto kompreneble.

René estis liberpensulo kaj oficiro de la Ordeno de Akademiaj Palmoj.

Mi, kaj certe la tuta asocio, pensas pri la doloro de Danièle kaj kore kondolencas ŝin.

Bernardo

Multe surprizis min la anonco de la subita forpaso de Renato ĉar antaŭ kelkaj semajnoj mi ankoraŭ ricevis de li mesaĝojn per la reto. Li regule informis min pri la agadoj de la movado «Libera Penso», en kiu li membriĝis. Ofte temis pri laikeco.

Sed li estis ankaŭ agema en la Esperanto-movado. Li estis membro de nia asocio kaj eĉ rolis kiel prezidanto inter 1996 kaj 2001. Li kaj la edzino tre afable akceptis nin, unufoje, en sia domo en Hure, okaze de nia ĝenerala jarkunsido. Ili ambaŭ, kune kun pluraj E-ĝirondanoj, partoprenis en la UK de Montpeliero en 98. Sed li estis ankaŭ farema en sia vilaĝo; ĉar li ŝatis kanti, li starigis korusan grupon kaj fine li fariĝis urbestro de Hure.

Pri Renato mi memoros pri serioza kaj afabla kamarado kaj mi sendas al lia familio kaj proksimuloj miajn sincerajn kondolencojn.

Joël

René Guillaume en 2005

Danièle, Philippe, Laurent
Marie-Noëlle, Rémy, Luc et Léo

GUILLAUME

6, Le Berdouzin

33 190 HURE

vous remercient de votre attention à notre égard en ces douloureuses circonstances. Votre courrier a été un réconfort.

Gardons le souvenir des bons moments.

Philippe

Laŭ la gazeto *Sud-Ouest* proksimume 600 personoj favore respondis al la alvoko por kuniĝi merkredon la 24an de aŭgusto sur la Placo de Ukrainio, nova kromnomo de la pavimplaco de la Homaj Rajtoj en Bordozo. La celo estis honori la 31an datrevenon de la Ukrainia sendependeco kaj samtempe memorigi pri la okazanta milito post la atako far la Rusa armeo ekinvadinte Ukrainion ĝuste antaŭ ses monatoj.

Lokaj subtenantoj miksiĝis kun translokitaj Ukrainoj, esence virinoj, pluraj kun infanoj, sed nur kelkaj viroj. Multaj el ili surmetis tradiciajn robojn, broditajn ĉemizojn kaj jupojn, ankaŭ florkronojn. Bluaj-flavaj rubandoj ornamis jen harplektaĵojn, jen vestojn, jen mansakojn. Samaj koloroj sur ŝminkitaj vangoj, okuloj, ungoj. Kaj kompreneble flagoj kaj flagetoj flirtis super la kapoj aŭ ĉirkaŭ la ŝultroj…
Post mallonga dulingva Ukr/Fr alparolo de respondeculinoj de la kunorganizintaj asocioj, ĥoreto kantis la ukrainian himnon kaj manon sur koro kunkantis multnombraj ĉeestantoj.

Sekvis manifestacio tra la stratoj de Bordozo ĝis unue la placo Gambetta kaj sekve ĝis la Borsoplaco. La paŝantoj kriis kelkajn sloganojn cele logi pasantojn al sia afero: «Ne rigardu nin! Kuniĝu al ni!»; aliajn proteste «Putino, teroristo!» aŭ atentige «Mariupolon, Buĉaon, ni ne forgesu!». Fakte francoj simple ne forgesu, ke nuntempe milito tie plu akras samkiel antaŭ ses monatoj. Tamen la amasinformiloj iom flankenlasis la tiutemajn novaĵojn. Tial Katia Bokatova, membro de la asocio Ukraine Amitié prave asertas: «Necesas daŭre mobiliziĝi por montri, ke daŭras milito kaj ke ni ne devas alkutimiĝi je tio.»

Enkonduke sur la Placo de la Homaj Rajtoj *kromnomita* Placo de Ukrainio*, traduko de la alparolo eldirita de* Katia Bokatova, *membro de asocio* Ukraine Amitié (Ukrainio Amikeco).

« Hodiaŭ ni honoras la 31an datrevenon de la Ukrainia sendependeco.

Ĉi-jare ni pli ol iam ajn antaŭe konscias pri la kosto, kiun ĝi pagas por ĝin defendi. Des pli ke ĝuste hodiaŭ antaŭ ses monatoj Rusio eklanĉis totalan invadon kontraŭ Ukrainio.

Ukrainoj pruvas siajn kuraĝon kaj determinon. Hodiaŭ la vorto *Ukrainio* simbolas rezistadon kaj liberecon.

Ukrainio jen estas la poeto Taras Shevchenko, la pentristoj Maria Primachenko kaj Kazimir Malevitch, la grafisto Georgij Narbout, la plej granda aviadilo de la mondo Mria, pintaj ciferecaj entreprenoj, naturaj kaj kulturaj riĉaĵoj enlistigitaj ĉe Unesko (ekzemple barĉo – betsupo).

Ukrainio jen estas Mariupolo, iam beleta urbo borde de Azovmaro. Ukrainio estas Buĉao, iam paca antaŭurbo de Kijivo.

Ukrainio jen estas Donetsko, Luhansko, Kharkivo, Mikolajivo: urboj ruinigitaj de la rusa armeo kaj hodiaŭ senigitaj je trinkebla akvo.

Ukrainio jen estas Eŭropo.

Simile al abeloj, ukrainoj estas laboremaj kaj pacemaj. Ili protektas sian abelujon, sian patrion, kiu ajn estu la kosto.

Simile al ŝildo, ili batalas por la paco en Eŭropo.

Nepre necesas daŭre subteni Ukrainion: paroli, flave-blue sin vesti, aĉeti produktojn el ukrainaj markoj, malkovri ĝian kulturon, akcepti translokitojn, plu mondonaci.

Ni hodiaŭ dankas ĉiujn personojn, kiuj subtenas Ukrainion. Kune ni estas la forto! Vivu Ukrainio! Vivu Eŭropo! Slava Ukraini! »

Katya Gradzion, ukraina esperantistino kunkantas la himnon.

Subtene al la Ukraina popolo, ĝiaj tradicioj kaj kulturo.

30 gedancantoj laŭ kanzono de la rokgrupo Okean Elzy (La oceano de Elza).

Sur la Borsoplaco konklude de la manifestacio, Alisa Baramidze, profesia koregrafino kaj dancistino alveninte en Francion komence de la milito, anoncis koregrafion prezentotan de plurgeneracia dancantaro improvizita antaŭ unu monato sub ŝia gvidado. Tradukis ŝian eldiron Svitlana Poix-Shinkaruk*, membro de la asocio* Maison Ukrainienne*.*

«Mi ĉiam pensis, ke milito rilatas al morto. Hororo, doloro, larmoj, perdo de proksimuloj, morto de nekulpantoj…

Nu, tiel estas! Milito estas terura.

Tamen samtempe milito rilatas ankaŭ al vivo.

Hodiaŭ ni altekoste pagas por nia estonteco, kiam niaj herooj estos respektataj. Estonteco, kiam multaj generacioj scios nomon de sia malamiko.

Ni estas ukrainoj, ni estas unu nacio, ni ĉiam portos en nia koro Ukrainion kaj ĝian kulturon.

Kie ajn en la mondo ni troviĝos, ni fieros pro niaj koloroj, kaj fiere levos nian flavan-bluan flagon super niajn kapojn.»

Sentiĝis fortaj emocioj en pluraj tempoj de tiu evento. Aparte plurfoje okaze de kunkantadoj. Kaj fine varmaj aplaŭdoj gratulis la artistojn kaj la kunorganizintojn.

Ankaŭ legu prie ĉe:
https://www.sudouest.fr/international/europe/ukraine/bordeaux-une-marche-pour-l-ukraine-aux-accents-musicaux-12026303.php

Marcelo

Ukrainiaj flagoj
la 24an de aŭgusto 2022 en Bordozo

Kompreneble abunde flirtis bluaj-flavaj flagoj okaze de la festo de la Ukrainia sendependeco. Pli mirinde videblis ankaŭ tiu ruĝa-nigra. Logite, scivoleme mi alproksimiĝis al la viro, kiu fiere ĝin portis. Post simplaj salutvortoj, kiuj komprenigis, ke mi estas franco, neparolanto de la ukraina lingvo, la cetero de la diskuto okazis dank' al tradukantinoj: lia filino rekte en la franca kaj Katja pere de Esperanto.

La standardisto klarigis, ke origine, post la unua mond-milito kaj la rusa revolucio, sur la flago de la ukrainaj naciistoj la flava koloro troviĝis supre kaj la blua malsupre. Tiun flagon portis ĉirkaŭ talio ĉiu ekstremista kozako dum bataloj por la Ukrainia sendependeco. Pro vunda sangoverŝo alikoloriĝis la zona ŝtofo. La flavo ruĝiĝis dum la bluo nigriĝis. Oficiale la nigra koloro simbolas teron, kaj la ruĝa, sangon de herooj, pereintaj por libereco kaj sendependeco de Ukrainio. Tiu flago estas standardo de la Ukraina ribela armeo (UPA); ankaŭ standardo de la Revolucio de Digno (2013-2014). Krome ĝi estas dua oficiala flago de Ivano-Frankivsjka provinco. En la jaro 2018 la flago iĝis oficiala standardo de nacia digno en Ukrainio, kiun oni devas pendigi kune kun la blua-flava flago dum la festotagoj!

Kaj tiun flagon de sangintaj herooj mortintaj sur batalkampoj transprenis la Organizaĵo de la Ukrainaj Naciistoj Revolucia (OUNR) en la jaro 1941, gvidata de Stepan Bandera. Tiu organizaĵo, fondita en la jaro 1940, dekomence kunlaboris kun la hitlera Germanio, celante, helpe de ties armeo, liberiĝi de la soveta potenco. Sed post la 30-a de junio 1941, kiam estis aklamita en Lvivo sendependeco de Ukrainio, faŝisma Germanio komencis persekuti ĝiajn membrojn. Stepan Bandera estis arestita la 5-an de julio 1941 kaj enkarcerigita en la koncentrejon de Sachsenhauzen. Sekve OUNR komencis radikale kontraŭbatali naziojn, samkiel sovetojn…

Tute ne estu konfuzo kun la ĉi-apuda samkolora flago de la liberecana movado!

Raportis Marcelo – Historion detalis Volidimir Hordijennko

ꕥ

Eldono de grava libro (en la angla) pri Esperanto kiel lingvistika faklingvo, verkita de du elstaraj lingvistoj. Senpage elŝutebla. Jen la recenzo kun la ligilo: https://www.liberafolio.org/2022/10/25/imitinda-lingvistika-priskribo-de-esperanto/
Mi jam mendis ĝin por la biblioteka universitato.

Elvezio

NIAJ KURSOJ

- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Mediateko Jacques Rivière), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46). La kursoj estas portempe neokazantaj.

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

LA FLANKA KANALO DE GARONO
aŭ
LAŬGARONA KANALO (1839-1856)

Mi loĝas en departemento Lot-Garonio de nelongtempe, kaj ŝatas promeni laŭ la riverego kaj ties kanalo. Tio sugestis al mi pli bone koni la historion de tiu lasta.

En la komenco de la 19a jarcento la navigado sur Garono ne estis facila inter Tuluzo kaj Bordozo: periodoj de minimuma rivernivelo ofte daŭradis; neantaŭvideblaj flualtiĝoj difektis la riverorandojn; akvofluoj estis potencaj; benkoj el sablo kaj gruzo dise kovris la fundon de la riverego; flosantaj muelejoj; ĉio tio endanĝerigis la navigadon. Ĉiu flosmuelejo estis ekipita per granda padelrado fiksita inter du ŝipoj. Sur la pli granda troviĝis la domo de la muelejo kun sakoj da grenoj kaj farunо. Ili kaŭzis gravajn akcidentojn kaj konfliktojn inter riverŝipistoj kaj muelistoj. Ili estis definitive malpermesitaj en 1840.

La Sudfranca Kanalo (antaŭe nomita Reĝa Kanalo de Langvedoko) funkciis ekde 1681 post 15 jaroj da laboregoj. Ĝi kunligis la urbon Seto kaj la maron Mediteraneo kun la urbo Tuluzo. Sed por ke la dikaj barkoj, kiuj de la Sudfranca Kanalo alvenis en Tuluzo, atingu Bordozon per Garono, oni devis transŝarĝi ilin sur platajn ŝipojn, kaj tio plipezigis la transportokostojn.

Projekto de kanalo apud Garono datumis de Antikveco, cele al ligo inter Mediteraneo kaj Atlantiko. Jam de la 17a jarcento *Vauban*, milita inĝeniero de Ludoviko la 14a, opiniis ke necesas plilongigi la Sudfrancan Kanalon ĝis la ĝirondia urbeto *La Reole*, sed sen sukceso. Sed en la 19a jarcento tiu projekto pri flanka kanalo de Garono realiĝis paralele al la riverego inter Tuluzo kaj la ĝirondia vilaĝo *Castets-en-Dorthe*, lasta punkto ricevanta la efikojn de la oceanotajdo. Tiun projekton realigis du Ŝtatinĝenieroj pri Pontoj kaj Vojoj, Jean-Baptiste de Baudre kaj Jean-Gratien de Job.

Akvodeklivo en Montech

La flanka kanalo komenciĝas en Tuluzo en la baseno *Ponts Jumeaux*, kie troviĝas la kuniĝo kun la Sudfranca Kanalo. Ĝi sekvas la dekstran bordon de Garono kun disbranĉiĝo en *Montech* ĝis la rivero Tarno apud Montalbano (Tarn-Garonio).

De *Montech* ĝi iras al *Moissac* (Tarn-Garonio), kie ĝi transfluas Tarnon sur kanalponto. Ĝi plufluas sur la dekstra bordo ĝis Aĝeno (Lot-Garonio), kie ĝi transfluas Garonon sur alia kanalponto. Nun sur maldekstra bordo, ĝi alvenas ĉe enflurivero *Baïse,* kiun ĝi transfluas ankaŭ helpe de kanalponto. Ĝi plilongiĝas ĝis *Castets-en-Dorthe* (Ĝirondio), kie ĝi eniras Garonon tie navigeblan.

Akvohaltejo en Meilhan

Garono flirtas kun la kanalo en Meilhan

Tiel ĝi trafluas kvar departementojn: Supra-Garonio, Tarn-Garonio, Lot-Garonio, Ĝirondio.

La akvo, kiu fluas en la du kanaloj venas de la Nigra Montaro en Supra-Garonio kaj de la lago *Saint-Ferréol*, fosita tiuokaze. La kulmino de la Sudfranca Kanalo situas sur la montpasejo *Naurouze* (Aŭdo), 189 metrojn alta, kie la akvoj dividiĝas: unu parto elfluas orienten, al Mediteraneo, alia parto okcidenten al Atlantiko. La du kunigitaj kanaloj fariĝas Kanalo de la du Maroj.

KARAKTERIZAĴOJ de LA KANALO
(laŭ Wikipedia)

- 18 metrojn larĝa
- 193 km longa (plus 10,5 por la disbranĉiĝo de Montalbano)
- la kluzoj: 53 (plus 10 ĝis Montalbano, plus 3 sur riveroj). En 1879 laŭ la modelo *Freycinet* ili mezuras 40,50 metrojn longe kaj 6 metrojn larĝe. Nur tiuj de *Montech* konservis la originajn dimensiojn, t.e. 30,40 metrojn longaj.
- niveldiferenco: 128 metroj
- ankradejo: 1,60 metro
- enakva alto: 1,50 metro
- alteco sub pontoj: 3,50 metroj.

La akvo-deklivon inventis germana inĝeniero de la 19a jarcento, *Julius Greve.* Tiun sistemon aplikis franca inĝeniero *Jean Aubert* paralele al la kluzoj ne sufiĉe longaj en *Montech*. Ĝi funkciis de 1974 ĝis 2009. Post renovigo ĝi fariĝis turisma kuriozaĵo en 2021.

Alia akvo-deklivo estis konstruita en 1984 paralele al la 8 kluzoj de *Fonserannes* sur la Sudfranca Kanalo apud Beziero (*Hérault*). Ĝi neniam bone funkciis kaj estas nun forlasita.

Estas la du solaj provoj de akvo-deklivo en Francio. Ili tamen konis internacian bonfamon.

Por la realigado de la laboregoj oni dungis regionajn homojn, sed ankaŭ multajn hispanajn rifuĝintojn pro karlisma milito (1833-1839) en ilia lando.

La laboregoj komencitaj en 1839 ĉesis en 1856, t.e. dek-sep jarojn poste anstataŭ la ses antaŭviditaj. Multaj kialoj kaŭzis tiun gravan malfruon: teknikaj incidentoj, rumoroj pri epidemioj pro akvokirlado, malfruo de la financado, sed precipe en 1844 projekto de konstruado de fervojo Bordozo-Tuluzo-Seto, kiu planis uzi la markostrekaĵojn de la kanalo. Tiu projekto estis konfidita al la Kompanio de Sudfrancaj Fervojoj kaj al tiu de la Apudgarona Kanalo. Finfine, en 1853, tiu projekto estis forlasita parte dank' al la urbo Bordozo, kiu subtenis la finfaron de la kanalo.

Kanalponto en Montpouillan

La unuaj longopartoj de akvovojo Tuluzo-*Montech*-Montalbano malfermiĝis en 1844 kaj, la 12an de marto 1856, la kanalo estis entute navigebla.

Koncerne la fervojon, ĝia ekfunkciigo sekvis de proksime tiun de la kanalo, en 1857. La kanalo estis koncesiita al la Kompanio de Sudfrancaj Fervojoj en 1858. La trafiko sur la kanalo, kiu ĝis tiam atingis pli ol 47.000 tunojn, falis je 18.000 en 1874. Sekve la agadon de la Profesia Sindikato de la Navigistoj sur Garono helpita de la urbestro de Nérac, Jean Baptiste Darlan, la ŝtato reakiras la kanalon kaj garantias ĝian administradon. Tiam la trafiko denove kreskis ĝis la jaroj 1970. De tiu dato ĝin anstataŭis la rivera turismo.

Dum la flualtaĵo de la 3a de marto 1930 la fervoja ponto situanta je 200 metroj de la kanalponto *Cacor* sur la rivero Tarno cedis sub la premado de la akvoj. Ĉar La kanalponto ne cedis, post senakvigo kaj taŭgarangĝo, la trajnoj uzis ĝin de majo 1930 ĝis majo 1932, kiam la nova fervoja ponto estis finita.

ARTAĴOJ SUR LA KANALO

Ili estas multaj:

- la kluzdomoj (tiu de *Castets-en-Dorthe* (Ĝirondio) estas rimarkinda kun sia monumenta ŝtuparo). Vidinda ankaŭ estas, sur tiu loko, la kastelo Du Hamel, kiu superstaras la kunligan punkton de la kanalo kaj Garono.

- la 66 kluzoj
- la 83 vojpontoj super la kanalo, ĉiuj rekonstruitaj en 1933.
- la 6 kanalpontoj inter Tuluzo kaj Bordozo. La plej rimarkindaj estas:
    - tiu en Aĝeno super Garono, 539 metrojn longa, 12,48 metrojn larĝa, 2,70 metrojn profunda;
    - kaj tiu de *Cacor* en *Moissac* (Tarn-Garonio) super la rivero Tarno, 356 metrojn longa, 8,35 metrojn larĝa, 2,70 metrojn profunda.
- la aliaj kanalpontoj super la riveroj:
    - *Barguelonne en Lamagistère* (Tarn-Garonio)
    - *Séoune en Lafox* (Lot-Garonio)
    - *Baïse en Vianne* (Lot-Garonio))
- *Avance en Montpouillan* (Lot-Garonio)
- la fama akvo-deklivo de *Montech*
- la flueto en *Laboulbène* en Aĝeno (subtera)

La kanalo perdis sian riverŝiparon sed pluvivas hodiaŭ dank' al la plezurŝipoj. Suno, mildeco de pejzaĝoj, trankvileco, revivigis ĝin. Laŭ ĝia vojiro pasinteco ekaperas sub formo de belaj mezepokaj arkitekturaĵoj, kiel la multnombraj bastidoj (vidu LEGI 159): *Aiguillon, Damazan, Vianne, Lavardac, Caudecoste, Donzac, Valence d'Agen, Dunes, Larrazet, Montauban, Grenade-sur-Garonne.*

Kluzdomo n-ro 45 en Montpouillan

La du partoj de la Kanalo de Du Maroj, konstruitaj 175 jarojn unu post la alia, hodiaŭ intermiksiĝas en sama memoro de historio pri ŝtono kaj akvo.

Laŭ la libro: ***LE CANAL LATERAL A LA GARONNE,*** *de* ***Charles Daney, Jacques Dubourg, Jean-Loup Marfaing. Editions Loubatières.***

(kun gramatika korektado de la cenona grupo)

Monique

PRI ESPERANTO
EN *LA REVUE DE L'AMOPA*

Jen artikolo en revuo, kaj la mesaĝo, kiun mi sendis. Espereble ĝi atingos lin.

Estimata S-ro Pruvost,

Ege dankon por mencii Esperanton kaj ilustri la fratecan uzadon de la lingvo en la lasta numero de *La revue de l'AMOPA*.

Mi certas, ke ĉiuj esperantistaj legantoj de la revuo ŝategis malkovri la bonan bildon de tiu lingvo, transdonitan de eminenta profesoro kiu, same kiel ni, vere amas la francan.

Plej kore,

Bernard P. SARLANDIE,

iama prezidanto de Espéranto-Gironde, kaj poste de AMOPA-Gironde



Quelles sont ces belles rencontres et depuis quand vous intéressez-vous à la langue française ?

Il me faut d'abord dire que par philosophie et par nature, je suis reconnaissant et fidèle envers mes aînés. Notamment envers mes parents, et quelques personnes ou institutions que j'ai rencontrées. Ma mère et mon père – inventeur d'une sténographie – étaient professeurs de sténodactylographie, donc spécialistes des mots transcrits dans un système phonétique, et maîtres des claviers avec les lettres au bout des doigts. À dix ans, ils m'avaient transmis leur savoir et à quinze ans, parallèlement au lycée, ils m'avaient fait passer des examens me permettant du jour au lendemain de remplacer des sténodactylos professionnelles. Mon père, qui ne me faisait jamais de compliments, confiait à ma mère que j'étais un sténographe hors pair : l'hérédité peut être ! Il voulait que je sois sténographe à la Chambre mais cela ne me disait rien, je l'ai déçu... : j'aimais la littérature et l'histoire et voulais être professeur de lettres. Par ailleurs, en espérantiste convaincu, il m'avait également appris l'espéranto au berceau et, à neuf ans, avant de commencer quelques humanités au collège, je me retrouvais dans des colonies de vacances avec d'autres enfants japonais, danois, italiens, irlandais, qui ne connaissaient pas ma langue, nous parlions donc espéranto... Je ne suis pas militant, mais indéniablement ce prélatin, avec ses déclinaisons et son jeu de racines, de préfixes et de suffixes, vous prédispose à aimer la morphologie et les systèmes linguistiques. Et ce fut en Faculté des lettres qu'eut lieu une rencontre déterminante.

Avec le Professeur Bernard Quemada, directeur du *Trésor de la langue française* ?

En effet, spécialiste de l'histoire des dictionnaires, à la tête du Conseil supérieur de la langue française, directeur du dictionnaire du CNRS, il racontait les mots, les dictionnaires, au prisme de l'histoire. C'était fascinant ! Aussi, même si je réussissais alors très bien dans les études littéraires, je décidais de ne plus quitter ce maître et j'enchaînais avec un

LA LIBRARO DE ESPERANTO-GIRONDE AL KVINPETALO

Vendredon la 28an de oktobro, sin retrovis en Palmer Bernardo, Marcelo, Klodin', Yannick kaj Janine. La tasko estis jena: malplenigi la ŝrankojn el ĉiuj donacotaj libroj kaj arkivaĵoj.

Bernardo prenis la arkivaĵojn, destinatajn al la Departementa Arkivejo; li sin ŝarĝis ankaŭ per unu el la ŝrankoj; siaflanke Yannick kaj Janine prenis la pli malpli 220 kilogramojn da libroj kaj unu gipsan kapon de Zamenhof por ilin porti al Kvinpetalo.

Dimanĉon la 30an, la libroj atingis Kvinpetalon, kie ili estis bonvene akceptitaj de Philippe Cousson kaj Bernard Lagrange. Do niaj libroj, zorge kaj profesie katalogitaj kaj etikeditaj far Philippe, estonte trovos lokon inter tiuj de Gaston Waringhien, Roger Bernard, Georges Lagrange, Maurice Sujet kaj aliaj…

Yannick kaj Janine

Arkivaĵoj en la veturilo de Bernardo

Du malplenaj ŝrankoj...

Pli ol dudek skatoloj da libroj kaj unu gipsa Zamenhofkapo vojaĝos kun Yannick ĝis Kvinpetalo

… el kiuj unu estas preta por translokiĝi ĉe Bernardon

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * * * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBLOUDE**
2 rue Raymond Lavigne
33100 BORDEAUX
Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr